Bonvolu studi la kondiĉojn dorsflanke kaj en la Dua Bulteno antaŭ ol mendi. Ĉiu kongresano devas plenigi apartan mendilon.
Sendu mendilon kaj pagon al Roterdamo aŭ al vialanda UK-peranto, sed ĉiam ambaŭ al la sama adreso. Pri pagmanieroj konsultu la Duan Bultenon.
La mendilo kaj la pago atingu la Centran Oficejon antaŭ la 1-a de majo 2004. Mendojn sen pagoj oni ne traktas.
Ne forgesu subskribi kaj dati la mendilon. Konservu kopion kaj portu ĝin al la kongreso.

MENDILO POR LA 89-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO
Pekino 2004, 24-31 julio

Nomo: _____ Kongresa numero: _____
Retadreso: _____ UEA-kodo: __ __ __ __ – __
Telefono: _____ Fakso: _____ Sekso: viro / virino (bv. cirkli)
Lando: _____ Vegetarano: ne / jes

LOĜADO

Laŭ la kondiĉoj presitaj en la Dua Bulteno kaj dorsflanke de tiu ĉi mendilo, mi mendas loĝadon en la sube signita kategorio ekde la _____ de julio (alvendato) ĝis la _____ de julio/aŭgusto (forirdato). Mi alvenas al Pekino la ____-an de julio, per flugo numero _____, alvenhoro _____ (aŭ alimaniere: _____, alvenhoro _____). La prezoj estas en eŭroj por unu nokto kaj por unu persono. Bv. cirkli la mendatajn numeron kaj kategorion.

HOTELO	kvalit-rango	loko en 1-pers. ĉambro	loko en 2-lita ĉambro
1 Continental Grand	4★	89	45
2 Crown Plaza	5★	93	48
3 International	5★	85	43
4 Catic Plaza	3★	77	38
5 Tibet	3★	61	30
6 Ya Yun Cun	3★	51	25
7a Foreign Experts (ĉamb.)	4★	50	25
7b Foreign Experts (apart.)	4★	61	31
8 Grand Hotel Yuanshan	3★	46	23
9a Cheng Hong (normallita)	3★	46	23
9b Cheng Hong (grandlita)	3★	44	21 (1-lita)
10 Wenbo Plaza	3★	31	15
11a Shengli (ĉamb.)	3★	28	14
11b Shengli (apart.)	3★	–	9 (5-lita)
12a Ya Cheng (1-pers./2-lita)	3★	21	11
12b Ya Cheng (3-lita)	3★	–	9 (3-lita)
13 Huiyuan Apartment		16 (4-pers.)	13 (6-pers.)
14 Nova Dadu Junulara Turisma		8 (plurlita)	–

Bv. *nepre* indiki alternativajn loĝkategoriojn (se ne eblas la supre indikita mendo): 1 _____ 2 _____ 3 _____ .
Mi dividos la ĉambron kun kongresano _____,
kies kongresa numero estas _____.
(Se vi ne havas kunĉambranon bv. nepre mendi unulitan ĉambron.)
Bv. re-kontroli la sumon de tagoj kaj mono!
Atentu la lastan daton: la dato de foriro!

A. Sumo por loĝado: ____ noktoj x _____ = EUR _____

ANTAŬKONGRESOJ		loko en 1-persona ĉ.	loko en 2-lita ĉ.
☐ A1	Ŝanhajo–Guilin–Xi'an–Pekino	820	700
☐ A2	Ŝanhajo–Zhouzhuang–Suzhou–Hangzhou–Pekino	545	440
☐ A3	Kunming–Dali–Lijiang–Xishuangbanna–Kunming–Pekino	990	880
☐ A4	Shenyang–Yanji–Chanbai-monto–Yanji–Pekino	480	390
☐ AX	Ekstra(j) nokto(j)		
	En Ŝanhajo: alveno 07/___ foriro 07/___	45	25
	En Kunming: alveno 07/___ foriro 07/___	30	15
	En Shenyang: alveno 07/___ foriro 07/___	55	28
	Sumo: _____ nokto(j) x prezo _____ = EUR _____		

B. Sumo por antaŭkongreso (A1/2/3/4+AX) = EUR _____

POSTKONGRESOJ		loko en 1-persona ĉ.	loko en 2-lita ĉ.
☐ P1	Pekino–Xi'an–Guilin	555	495
☐ P2	Pekino–Xi'an–Dunhuang–Turpan–Urumqi–Pekino	1245	1095
☐ P3	Pekino–Chengdu–Chongqing–Tri Gorĝoj–Yichang–Ŝanhajo	1050	990
☐ P4	Pekino–Chengdu–Lhasa–Chengdu	1485	1195
☐ PX	Ekstra(j) nokto(j)		
	En Guilin: alveno 08/___ foriro 08/___	40	23
	En Pekino: alveno 08/___ foriro 08/___	55	28
	En Ŝanhajo: alveno 08/___ foriro 08/___	45	25
	En Chengdu: alveno 08/___ foriro 08/___	50	25
	Sumo: _____ noktoj x prezo _____ = EUR _____		

C. Sumo por postkongreso (P1/2/3+PX) = EUR _____

DUMKONGRESAJ EKSKURSOJ

Mi mendas la jenajn ekskursojn laŭ la kondiĉoj en la Dua Bulteno kaj dorse de tiu ĉi mendilo: (bv. indiki per cirkloj kaj kalkuli la sumon helpe de la tabeloj)

TUTTAGAJ EKSKURSOJ	mar 27 jul	mer 28 jul	ĵaŭ 29 jul	ven 30 jul	prezo
E1 Granda Muro/Maŭzoleo	E1	E1	–	–	37
E2 Tianjin	–	E2	–	–	30
E3 Orientaj Maŭzoleoj	–	E3	–	E3	39
E4 Tanzhe-templo/Shihua-groto	–	E4	E4	–	32
E5 Hongluo-templo/Granda Muro	–	E5	–	–	40

DUONTAGAJ EKSKURSOJ	sab 24 jul	dim 25 jul	lun 26 jul	mar 27 jul	ĵaŭ 29 jul	ven 30 jul	prezo
D1 Palaco/Placo	D1	D1	D1	D1	–	–	19
D2 Hutong-oj/Gong.	–	D2	–	D2	D2	–	20
D3 Altaro/Pordego	–	D3	–	D3	D3	–	18
D4 Som. Palaco/Best.	–	D4	–	D4	D4	D4	21
D5 Yonghe/Konfucea	–	–	–	D5	D5	–	17
D6 Parko/Templo	–	D6	–	–	–	D6	16
D7 Lugou-ponto	–	–	D7	D7	–	D7	15
D8 Str. Liulichang	–	–	–	–	–	D8	11

D. Sumo por dumkongresaj ekskursoj EUR _____

☐ **E. Bankedo** 45 EUR **EUR _____**

☐ **F. Transporto flughaveno-hotelo** (nur unudirekte; informoj pri la precizaj alvendatoj, horoj kaj flugnumeroj aperu supre en la maldekstra kolumno; post la 1-a de junio transport-biletaj mendoj sen tiuj informoj ne estos efektivigitaj) 10 EUR **EUR _____**

☐ **G. Bankkostoj** (banko, aŭ ĉeko) 10 EUR **EUR _____**

RESUMO: A. Loĝado EUR _____
B. Antaŭkongreso EUR _____
C. Postkongreso EUR _____
D. Dumkongresaj ekskursoj EUR _____
E. Bankedo EUR _____
F. Transporto flughaveno-hotelo EUR _____
G. Bankkostoj EUR _____

PAGENDA SUMO ENTUTE EUR _____

☐ Mi pagas per kreditkarto n-ro _____
valida ĝis _____.
(bv. cirkli: Visa / American Express / Master-Eurocard)
Mastercard/Visa-kontrolnumero (tri ciferoj, dorse de la karto) __ __ __

☐ Debetu mian UEA-konton __ __ __ __ – __ (se kredita).

☐ Mi pagas per banko / ĉeko / poŝto / alie _____.

_____ _____
Loko kaj dato Subskribo

por uzo en CO: dato ..... pago ..... E
u h e f m k r p l saldo .....

Kvitanco
Ni konfirmas la ricevon de la ĉi-supraj mendoj kaj pago de _____ EUR.
☐ Via pago estas kompleta.
☐ Vi ankoraŭ ŝuldas _____ EUR.
☐ Vi havas krediton de _____ EUR ĝiritan al via UEA-konto (prenebla dum UK).
Roterdamo, la _____ KONGRESA ADMINISTRACIO
Post rericevo el la CO bonvolu kunporti ĉi tiun kvitancon al Pekino!

ĜENERALAJ KONDIĈOJ KAJ REGULOJ DE MENDOJ KAJ MALMENDOJ

KONGRESANO
1. UK akceptas mendojn nur de registritaj kongresanoj. Registrita kongresano estas konsiderata tiu kiu ricevis konfirmon pri sia aliĝo. Sur la konfirmilo estas menciitaj kongresa numero (KN) kaj uea-kodo, kiujn oni klare indiku sur la mendilo.

DUA BULTENO
2. Ĉiu registrita kongresano ricevas Duan Bultenon (DB), kiu enhavas detalajn priskribojn de la mendataj servoj: loĝado, ekskursoj, bankedo, antaŭ- kaj post-kongresoj, kaj aliaj ofertataj servoj.

PRISKRIBO DE LA MENDATAJ SERVOJ
3. UK sin devigas liveri ĉiujn servojn laŭ la priskriboj en la DB. UK ne respondecas pri (ne)plenumo de servoj ne menciitaj en la DB.

MENDILO
4. Kongresanoj faras siajn mendojn per sendo de la kongresa mendilo (speciala mend-formularo en la DB) al la Centra Oficejo (CO) en Roterdamo aŭ al sia landa peranto. Loĝantoj de la kongresa lando sendas siajn mendilojn al la kasisto de LKK.

BAZAJ INFORMOJ
5. Sur la mendilo kongresano indikas siajn familian nomon, landon, kongresan numeron, uea-kodon, sekson kaj eventualan vegetaranecon. De tiuj informoj dependas la ĝusteco kaj rapida trakto de la posta mendo. UK ne respondecas pri eventualaj mismendoj kaŭzitaj pro manko de tiuj informoj sur la mendilo.

KONDIĈOJ DE MENDOJ
6. Mendilo devas esti subskribita de la kongresano kaj havi daton de la subskribo. Per sia subskribo la kongresano akceptas la kondiĉojn priskribitajn en la DB kaj tiu ĉi regularo.
7. Por ĉiu kongresano necesas plenigi apartan mendilon. Oni ne akceptas mendojn por pluraj personoj sur unu mendilo.

PAGOJ
8. Ĉiu mendo devas esti akompanata de la kompleta pago por la koncernaj mendoj. Oni traktas la mendojn nur post la ricevo de la pago. Kiel daton de la mendoricevo oni konsideras la daton de la ricevo de la pago. UK ne respondecas pri eventuala malfruiĝo aŭ misvojiĝo de la pagoj. *Mendiloj kaj pagoj nepre estu senditaj al la sama instanco.*

PAGMANIEROJ
9. Pri la pagmanieroj validas la instrukcioj en la DB. Loĝantoj de la kongresa lando pagas al LKK en la landa valuto. Al la perantoj en transpagipovaj landoj oni pagas en la nacia valuto, laŭ la tarifoj kiujn fiksas la peranto mem. Al la sumo de la kongresaj mendoj la kongresano devas aldoni ankaŭ la bankajn aŭ poŝtajn kostojn, depende de la transpaga maniero.

PREZOJ
10. Ĉiuj prezoj cititaj en la DB estas en eŭroj (EUR) kaj rilatas unufojan servon por unu kongresano. Se temas pri loĝado en plurlitaj ĉambroj (dum UK aŭ dum la ekskursoj) la prezo rilatas unu personon por unu nokto.

LIMDATOJ
11. Mendiloj kaj pagoj devas atingi la CO en Roterdamo (respektive la peranton, aŭ LKK por la loĝantoj de la kongresa lando) antaŭ la 1-a de majo de la kongresa jaro. Post tiu dato oni ne povas garantii plenumon de la mendoj. Post la 1-a de junio de la kongresa jaro oni ne plu akceptas mendojn.

KROMPAGO POR MALFRUA MENDO
12. Por la mendoj por loĝado, antaŭ- kaj post-kongresoj faratj post la 1-a de majo necesas aldoni krompagon de 40 EUR, se oni mendas hotelan loĝadon, antaŭ- aŭ post-kongresajn ekskursojn. Por la ceteraj mendoj (ekskursoj, bankedo k.s.), se oni ne mendas loĝadon, la krompago estas 20 EUR.

KONFIRMOJ
13. Kongresanoj kiuj mendas antaŭ la limdato, ricevos konfirmon de siaj mendoj: kvitancitan kopion de la mendilo, kiu montras ke la pago estas bonorde ricevita. La konfirmitan kopion necesas kunporti al la kongreso.

NESUFIĈAJ PAGOJ
14. Se la kvitanco montras ke vi ne pagis sufiĉe, bv. tuj pagi la diferencon. Se la ŝuldo estas malpli ol 20 EUR oni povas pagi ĝin dum la UK.

KONFIRMO DE MALFRUAJ MENDOJ
15. Se oni mendas post la limdato (1-a de majo) oni devas atendi konfirmon pri la akcepto de la mendo, senkonsidere pri la alveno de la pago. UK rezervas al si la rajton rifuzi aŭ nur parte plenumi malfruajn mendojn.

MALMENDOJ
16. Malmendoj devas esti skribaj (ankaŭ retmesaĝoj kaj telegramoj konvenas). Ili atingu la CO antaŭ la 1-a de junio de la kongresa jaro. Por malmendoj faritaj ĝis la 1-a de junio oni repagos la tutan mendosumon, minus 15 EUR por la administraj kostoj. Ĉe pli postaj malmendoj oni perdas procentaĵon de la pagita mendosumo – 10% ĝis la 15-a de junio, 30% ĝis la 30-a de junio, 75% ĝis la 12-a de julio. Post tiu dato ne eblas repagoj.

LOĜMENDO
17. Datoj: sur la mendilo oni nepre indiku la daton de la alveno (unua nokto en la hotelo) kaj la daton de la foriro (lasta mateno en la hotelo).

KUNLOĜANTOJ
18. Se oni mendas loĝadon en plurlita ĉambro kaj ne jam havas elektita(j)n kunloĝanto(j)n, la Kongresa Administracio rajtas loĝigi la mendanton kun ajnaj aliaj kongresanoj de sama sekso, aŭ loki la mendanton en unulitan ĉambron kaj postuli krompagon pro la prezdiferenco. Ankaŭ por ĉiu nokto pasigita sola en plurlita ĉambro oni postulas tarifon por tuta ĉambro. En multlitaj loĝejoj la Loĝiga Servo mem kunloĝigas la mendantojn de sama sekso kaj ne povas respondeci pri la hazardaj kunloĝantoj nek akcepti plendojn pri io ajn krom pri eventuala neplenumo de la kondiĉoj promesitaj en la Dua Bulteno.

REKLAMACIOJ KAJ REPAGOJ
19. Ĉiuj reklamacioj kaj postuloj pri la repagoj (ekz. pro neliveritaj aŭ neuzitaj servoj, nepartopreno k.s.) devas esti faritaj skribe al la CO en Roterdamo, antaŭ la jarfino de la koncerna kongresa jaro. Postaj repagoj ne eblos pro likvido de la kongresaj kontoj. Se eble la reklamacion oni faru jam dum la UK.

ŜANĜOJ DE MENDOJ / ALTERNATIVAJ MENDOJ
20. Se ne eblas plenumi iun el la mendoj, la Kongresa Administracio rezervos alternativajn servojn, se la kongresano indikis ilin sur la mendilo. Se ne estas indikitaj alternativoj, la Administracio kontaktos la kongresanon por konsultiĝo.

KORESPONDADO
21. Pri ĉiuj aspektoj de viaj mendoj, samkiel pri aliaj kongresaj aferoj, bonvolu korespondi kun la CO en Roterdamo (do ne kun LKK).